

Agado Per-Esperanto por subteni daŭripovan evoluon

UN lanĉis la 17 novajn evoluo-celojn. La Esperanto-Movado pretas kunlabori rilate daŭripovon:

- unue informi pri kaj instrui Esperanton;
- due agadi por-Esperanto en evoluiĝantaj landoj;
- trie agadi per-Esperanto subteni evoluon ĝenerale.

Necesus organiza subteno flanke de UEA kaj SAT kaj de naciaj Esperanto-organizaĵoj tiel ke la financaj subtenoj povus esti kolektataj pli efike kaj regule, organize subtenanta la izolitan agadon de unuopaj grupoj (kiel AVE) aŭ personoj. Subteno temas pri:

1. Bezono da formalaj donaco-kvitancoj por la financ-oficejoj de unuopaj ŝatoj, tiel ke donacantoj povas redukti sian imposto-pagon, kio ĉefe gravas se firmaoj aŭ aliaj fondusoj donacas.

2. Inform-kolekto pri kvalito de tiaj projektoj; unue kiel datum-bazo kaj due indus havi konfirmon de neŭtrala persono pri la faritaj projektoj malgraŭ tio ke 100%a garantio ne eblas.

AVE (kunlaboranta fakasocio de UEA pri Ekologio) en kunlaboro kun aliaj grupoj da esperantistoj kaj eĉ ne-esperantistaj grupoj subtenadas projektojn en Tanzanio kaj D.R. Kongo, kaj kelkfoje personojn.

„**Mazingira**“ (vilaĝaro Ketare/Marambeka en nord-okcidenta Tanzanio proksime de Bunda), surloke organizita de esperantisto Mramba Simba; kunlaboro kun AVE jam ekde 2006, krome subtenas aliaj grupoj ĉefe en Francio, Belgio kaj Nederlando:

- putoj por trinkakvo, kaj kolekti pluvakvon por bestoj kaj akvumi la ĝardenojn
- lernej-kostoj por orfoj, por materialo kaj „uniformo“
- konstruado de dua mez-lernejo "Esperanto Secondary School" en Marambeka (ESS)
- agrikulturo, sunflora oleo, kaj rearbarigo
- operacioj de kriplitaj infanoj, ofte pro vakcinado kontraŭ malario
- regajneblaj energioj (fotovoltaiko, sun-kuirforno)

Projekto 2017 estas internato por lernantinoj en ESS Marambeka – la unua ŝtupo estos por 8 knabinoj, sed prefere por 16. La material-kostoj estus 6 mil, respektive 10 mil Euro. Ili loghos tie ghis la ferioj, ĉar kelkaj estis perfortitaj sur la longa vojo (ghis 10 km). Ili ricevos nutraĵon de la gepatroj. Ni intencas kolekti 6.000 Euroj, inter tiuj esperas 5 mil de dunganto-fonduso de firmao Bosch.

"**Akvo por Kalima**" (duopa urbo kun 130 mil enloĝantoj), provinco Maniema, D.R. Kongo

- unue ni subtenis la agadon de esperantisto Etienne kiu studis agrikulturon, aĉeti labormaterialon re-aktivigi fiŝ-lagojn (el la belgia kolonia tempo)

- **2017 ni estas je la financado de la 4-a projekto** de Etienne Katchelewa "Akvo por Kalima", ĉar nur malmultaj havas aliron al salubra trinkakvo. Temas pri nova fonto, prilaboro de la akvo kaj provizo de malmultaj subĉielaj kran-aroj per tubo. Ni bezonas 25.000 Eurojn: 6 mil el Kalima, 4 mil de vi, niaj samideanoj kaj aliaj subtenantoj, kaj kiel grava kondiĉo 15 mil denove de la germana firmao WKV-AG (ili produktas mezgrandajn akvo-generatorojn kaj instalas ilin tutmonde).

La raporto pri la 3 sukcesaj projektoj provizi salubran trinkakvon por ĉ. 9.000 homoj estas elŝutebla kun aŭ sen fotoj. Ni sukcesis varbi dum pluraj jaroj entute 15.000 Euro de WKV AG, kaj minimume 6 mil dank al kolekto inter niaj samideanoj.

Jen konciza informo kun fotoj verkitaj de Betty el Kopenhago: <http://rosejo.blogspot.dk/>

„**Uvira**“, Suda Kivuo, D.R. Kongo - Martin Fadhili :

- lernopago por **orfoj** (momente 2 georfojn)
- **Rearbarigo** kaj ĝardeno-projekto (malgranda projekto komence de Augusto 2017):

Martin plendis ke oni forhakis arbarojn dum la militado, kaj poste pro la uzado da ligno-karbo. Necesus konstrui kuir-fornojn kiuj estas pli efikaj, aŭ eĉ konstrui sun-fornojn, kiuj reduktos la bezonon da ligno-karbo.

Kune kun lernantoj li intencas kultivi arbidojn kaj poste planti ilin en la regiono de Uvira (je la norda rando de la lago Tanganjika) por replanti arbarojn. Kiel ni lernis de Wangari Maathai rearbarigo estas la kondiĉo por teni la akvon en la regiono, kaj ricevi pli da pluvo kaj trinkakvo. Krome Martin ankaŭ kultivos legomojn por bona nutraĵo.

Li subtenas grupon da lernantoj, kiuj ankau lernas Esperanton. Dum la ferioj (kaj la pluv-sezono) en Aŭgusto ili faros la praktikan laboron en la ĝardeno. Pro tio ni sendos la monon (inter 200 - 500 Euro) por aĉeti semojn kaj ilojn komence de Aŭgusto.

Mi petas vin subteni la projektojn lau viaj eblecoj.

Kiel subteni unu el tiuj projektoj ?

UEA-Konto de AVE: avex-z (menciu la projekton)

Alternative : al Stiftung-Bruecke.de (kiu estas formala organizo, kontraste al AVE)

Ernst-Barlach-Str. 45, 79312 Emmendingen
Bank für Sozialwirtschaft, IBAN : DE12 1002 0500 0003 2474 04, BIC : BFSWDE33BER

Bonvolu mencii la projekton ; kaj ankau vian adreson (en Germanio) se vi ŝatas ricevi kvitancon.

Koran Dankon !

**D-ro Manfred Westermayer
(Asocio de Verduloj Esperantistaj)**

Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen, Germanio
e-mail : manfred@westermayer.de
AVE: www.verduloj.org/afriko.htm (> raportoj)